# AVANCO

1/97
Januaro-Aprilo
(VIII-a jaro, Nro. 3)

Oficiala organo de Kuba Esperanto-Asocio

SPECIALA NUMERO

ENHAVO

# ESTRARA RAPORTO

# 1996

## Estimataj:

Jen la unua numero de 1997. Al vi ĉiuj, feliĉojn, bondezirojn kaj sukcesojn senfinajn en via por esperanto agado, nome de la Nacia Estraro kaj de la Asocio entute.

Komenciĝas la jaro kaj novaj laborperspektivoj kaj planoj frapas niajn pordojn; ĉi momente, tamen, por la Avanco-legantaro taŭgas legi kaj analizi ĉu niaj deziroj kaj revoj realiĝis kaj rezultis. Pro tio, ni inkluzivas ĉi-numere la Estraran Raporton de KEA pri la laboro dum 1996.

La rekomendo? analizi kaj taksi ĉion.

Via redaktoro,

Alexis



## NACIA ESTRARO

***Julián Hernández Angulo**
Prez.. Atentas plenumon de ĉiuj taskoj kaj fakoj.

***Maritza Gutiérrez González**
Ĝenerala Sekr.. Kontrolas internan agadon.

***Alberto Rodríguez Pineda**
Financoj, k. administrado de la Centra Oficejo.

***Héctor Jiménez Batista**
Instruado k. ILEI-Sekcio.

***Juan Ramón Rodríguez Gómez**
Intern. kaj Pub. Rilatoj, Historio, Bibl. k. Libroservo. Ĉefredaktoro de Universo.

***Pedro Fernández Rodríguez**
Kulturo. Artaj kaj klerigaj aranĝoj.

***Alexis Otero Castellón**
Informado. Ĉefredaktoro de Avanco kaj La Noktuo

### Komisiitoj

***Martha Alonso Gutiérrez**
Kultura kunordigo.

***Juan Lázaro Besada Toledo**
Atento al verkistoj.

***Alberto García Fumero**
Scienco kaj tekniko.

***Miguel A. González Alfonso**
Membroj subtenantoj.

VIII-a jaro, nro. 3 (1/97, jan.-apr.) / Aperas 3 foje jare / Eldonas Kuba E-Asocio / PF.: 5120; 10500 Havano, Kubo / Telefonnumeroj: 40-1364 k. 40-4484/ Fakso: 53 7 33 87 29 / Ĉefredaktoro: Alexis Otero Castellón / Grafika aranĝo kaj kunredakto: Juan Ramón Rodríguez / Kunlaboris: Nacia Estraro kaj Roberto Molina / Prezo: 1:00 CUP (enl.), 2.00 NLG aŭ 2 irk. (eksterl.), pagendaj al KEA-konto ĉe UEA: keaux-u / Ĉiuj rajtoj rezervitaj / Reproduktado permesata (indiki fonton k. sendi du ekzemplerojn al la Redakcio).

# KOMITATANOJ KUNSIDIS EN GUANTANAMO

***Maritza Gutiérrez González***

La tradicia plenkunsido de la Nacia Komitato de KEA kunvenis ĉifoje en la plej orienta provinco nialanda, tutmonde fama pro la konata kanto **Guantanamera**, inter ni **Kamparanino**. La 24an kaj 25an de januaro, la orienta urbo samnoma, gastigis nin dece, danke al kolektiva laboro de entuziasma teamo kiu preparis ĉiujn necesajn kondiĉojn por sukcesigi la plej gravan laborkunvenon de nia gvida organo.

La kunsidon partoprenis 17 komitatanoj el 23 plenrajtaj, kio garantiis la bezonatan kvorumon. La reprezentantoj de KEA-filioj raportis pri la agado plenumita en la koncerna teritorio dum la jaro 96. Kiel ĉiam, oni detale analizis la ***Estraran Raporton*** de la Nacia Estraro, KIES ENHAVO ONI POVAS LEGI EN TIU ĈI GAZETO. Oni ĝin aprobis samkiel la jaran bilancon, kies pozitiva rezulto eĉ, se ne tro signifa en kelkaj eroj, indikas ke la Asocio sukcesas kontentige travivi la krizan periodon kiu daŭre envolvas la kuban socion.

La komitatanoj detale analizis la ĉefajn problemojn asociajn rilate al organizaj demandoj derivitaj el diversaj faktoroj, inter ili manko de taŭgaj aktivuloj en kelkaj regionoj de la lando. Tiu ĉi aspekto influis en tio ke ni devas multe insisti pri la necesa kontrolo de nia membraro kaj konstanta aktualigo de tiuj statistikoj. Tiusence, la prezidanto de KEA, Julián Hernández, emfazis pri la nepra informa fluo inter la diversaj asociaj estraroj kaj la Nacia Estraro.

Aliaj punktoj longe debatitaj rilatis al instruado kaj informado, tial ke ambaŭ oni konsideras kiel prioritatajn fakojn, pro tio ke ili rolas fonton de novaj esperantistoj, laŭ nia tradicia laborstilo pri ofertado de kursoj, kiuj dum la lastaj jaroj ampleksas je novaj eblecoj. Tra la tuta lando, oni lanĉas oferton de perkoresponda kurso, kiu evidente konsistigas bonan alternativon por interesiĝantoj, sed ankoraŭ alfrontas plurajn malfacilaĵojn en ties propra interna funkciado. Tion oni ĝuste pritraktis kaj la necesa seriozeco de la koncernaj respondeculoj. Oni akceptis proponon kompromisan tiel ke ĉiu filio laboros por varbi minimuman kvoton de novaj lernantoj al la kurso, escepte de la filio en Urbo Havano. Tiukaze, la Centra Oficejo de KEA rekte okupiĝos pri tiuspeca kurso.

Dum la Komitato, Camagüey estis elektita la plej elstara filio de la jaro '96, pro la altigo de membraro, organizaj aspektoj kaj la teama laboro, certe laŭdinda. Rilate al eventoj (vidi paĝon 16), oni laboros por ke ili konsistigu modelajn antecedentojn pri Nacia Kulturfestivalo, okazonta en 1998.

Sendube, la nacia Komitatkunsido estis bona momento por funde analizi pasintecon kaj plani estontecon. Oni fiksis la strategian laborlinion por la jaro '97 kun prioritatoj kaj konkretaj planoj. Unu plian fojon, oni gratulis la lokan preparkomitaton estritan de Roberto Cutiño, prezidanto de la loka filio kaj juna, sed sperta esperantisto kiu arigis entuziasman teamon kontribuinta al sukcesa kunsido. Dum la lasta vespero okazis simbola flago-transdono al la venontjara sidejo de la 15a Komitatkunsido, kiu estos la orienta provinco Granma. La 14a Komitatkunsido konfirmis la decidon de la kubaj esperantistoj progresigi la landan movadon kaj daŭre kontribui al la internacia E-movado. Pruvo pri tio estis la fakto ke oni dediĉis tempon al la Manifesto de Prago, kies enhavo la kubaj esperantistoj trastudos kaj subskribos dum la venontaj semajnoj. Tiamaniere, ni konfirmos nian sintenon pri la grava manifesto.

## ENKONDUKO

Kiam apenaŭ pasis kelkaj monatoj kaj la spuroj de nia dua tutlanda Kongreso latentas en niaj mensoj, ni, naciaj komitatanoj de KEA, denove renkontiĝas por analizi kiom multe ni faris kaj kion ni ne faris celante daŭre perfektigi nian esperantistan agadon.

Vizitoj, renkontiĝoj, kunsidoj, kulturaj aranĝoj, korespondado, informado, instruado, sciencteknika agado, partopreno en naciaj kaj internaciaj eventoj kaj plej diversaj publikaj kaj internaciaj rilatoj igis niajn planojn realo.

Ni konsideru niajn atingojn, ĉar ili fakte respegulas kiom efikaj kaj fruktodonaj estis niaj streboj kaj klopodoj, sed ni multe pli emfazu kaj dediĉu tempon al niaj neatingoj, ĉar ili ebligos al ni korektigi niajn gvidprocedojn kaj polurigi nian labormanieron.

Endas ke ni estu tre kritikaj kaj memkritikaj en tiu ĉi Komitatkunsido kaj post ĝi, ĉiam aŭskultante konsilojn kaj opiniojn de niaj laboremaj, sindonemaj kaj bonintencaj aktivuloj; ni kun entuziasmo reiru al nia ĉiutaga laboro, ĉar nur tiel ni povas konstante progresi.

Antaŭ kelkaj monatoj, dum la 81a UK-o en Prago, la Komitato de UEA proponis al la esperantistaro de la mondo la Manifeston de Prago, de la movado por la internacia lingvo Esperanto. Ni alstrebu daŭre disvastigi ties enhavon al la neesperantista publiko, tiel ke pli kaj pli da personoj estu informitaj pri la movado kaj kunpartoprenu en nia strebado progresigi la lingvon kiel unu plian alternativon al la internacia lingva ordo.

## ORGANIZO

La jaro 96 plenplenis je taskoj variaj ekde enkongresa komitato ĝis plej detalaj taskeroj, kies plenumo postulis de ni gravan atenton. Ni ne povas konsideri la jaron 96 kiel elstara ĉifake, tial ke ni ne sukcesis multon pli fari sur tiu ĉi kampo. Tamen, ni sukcesis iel ne perdi antaŭajn farojn kaj iom pli spertiĝi kaj serĉi manierojn revigligi organizajn formulojn rilate al interna funkciado de estraraj kunvenoj, raportoj kaj pli vigligi kontaktojn kun filioj, kvankam fojfoje la rezultoj ne atingis la atenditan nivelon.

## INFORMA FLUO

Komence de la jaro, okaze de la Komitatkunsido kaj Kongreso, ni povas konsideri ke la informoj fluis tre bone kaj ni kontaktis per cirkuleroj kaj aliaj rimedoj la filiojn tutlande. Pri la elektoj, ni same preparis komunikojn diversajn kaj tre bone fluis.

En la dua trimestro de la jaro kaj poste, nepre malpliiĝis la informa fluo tra la lando. Ĝenerale, en komparo kun la antaŭa jaro, ni konsideras ĝin sufiĉe stabila rilate al kelkaj specifaj filioj, kiaj Santo Domingo (Villa Clara) , Granma, Camagüey, Santiago de Cuba, Pedro Betancourt (Matanzas) kaj Havanurbo. Ĉiel ni konsideras ĝin plibonigenda aspekto de nia laboro, tial ke, sen la necesa informado, la laborkvalito povas malaltiĝi konsiderinde.

## MEMBRO-KONTROLO

Tiu ĉi estas aspekto kiu, dum la lastaj jaroj, kondutas sufiĉe stabile ĉirkaŭ ciferoj kiuj ne atingas milon; tamen, konsidere al la nuntempaj kondiĉoj travivataj de niaj homoj kaj al la ĝenerala konduto de la internacia E-movado, eblas ĝin konsideri kontentiga. Malgraŭ ĉio, ni konsciu pri la graveco varbi novajn homojn al la movado kaj reteni la membraron ekzistantan. Sekve, ni prezentas nian plej aktualan statistikon pri la membraro tutlanda. Indas rekoni la elstaran kaj konstantan laboron de filio Camagüey en tiu ĉi aspekto; dum, menciindas la streboj faritaj de Havanurbo, Santiago de Cuba kaj Santo Domingo (en rilato kun ties kontribuo en Morón).

## KEA-MEMBRARO DUM 1996

| FILIO | I-a SEMESTRO | II-a SEMESTRO |
|---|---|---|
| PINAR DEL RÍO | - | - |
| HAVANURBO | 115 | 122 |
| HAVANO | 2 | 2 |
| -STA. CRUZ | 2 | 2 |
| -QUIVICÁN | - | - |
| MATANZAS (P. BETANCORT) | 19 | 19 |
| SANCTI SPÍRITUS | - | 10 |
| VILLA CLARA | 36 | 32 |
| -STA. CLARA | 4 | - |
| -STO. DOMINGO | 32 | 32 |
| C. DE AVILA (MORÓN) | - | 18 |
| CAMAGÜEY | 106 | 188 |
| LAS TUNAS | 21 | 21 |
| HOLGUÍN | - | - |
| GRANMA | 14 | 22 |
| SANTIAGO DE CUBA | 72 | 72 |
| GUANTÁNAMO | 8 | 37 |
| TOTALO | 393 | 543 |

## INTERNA VIVO

Dum la jaro, la Nacia Estraro (NE) efektivigis ĉiujn ordinarajn kunsidojn, krom eksterordinarajn prikongresajn, komence de la jaro. Ĉiumonate, oni kontrolis strikte la plenumon de ĉefaj taskoj kaj aliajn interkonsentojn.

Ni proponis starigon de fakaj laborplanoj de unuopaj estraranoj, cele al pli organizita laboro rilate al interna kontrolado de taskoj. Eventuale, tiu ĉi laboraspekto plibonigendas por atingi plian tempoŝparon dumkunside.

Ni entreprenis demarŝojn rilate al oficialigo de filio Guantánamo je municipa nivelo, kies daŭroproceso ankoraŭ ne finitas.

Alia menciinda aspekto de la asocia vivo estis ke ne ĉesis la proceso pri membro-kategoriigo iniciatita pasintjare. Filioj kiaj Santiago de Cuba, Havanurbo kaj Camagüey proponis pliajn membrojn por ricevi kategoriojn laŭ la kondiĉoj. Ni daŭre petas al filioj atenti tion kaj stimuli la aktivulojn kaj membrojn labori en tiu direkto.

## 13-a KOMITATKUNSIDO

Ĝi funkciis en Havanurbo kadre de la Dua Nacia Kongreso kaj partoprenis ĉiuj komitatanoj. Laŭstatute, estis elektojaro kaj tiurilate funkciis la elektokomisiono elektita unujaron antaŭe.

La Komitatkunsido postulis gravan labortempon de la Estraro por dokumentaj preparoj, sed la rezulto estis fruktodona kaj niaj komitatanoj montris sin pli spertaj kaj maturaj.

## PROTOKOLOJ

La protokoloj monate rolis gravan informan fonton kaj ili estis analizindaj dumkunside far la filiaj estraroj. Monate, ni sendis ilin provincen, sed ne ĉiam tiom akurate kiel dezirate. En tiu ĉi aspekto, ni konscias pri la neceso agi pli vigle; tamen, de nun ni postulos konfirmon monatan flanke de la filioj, tiel ke ni sciu pri la ricevo aŭ ne de niaj protokoloj. Ni jam entreprenos simplan mekanismon por tion kontroli kaj iel eviti fuŝojn, perdojn aŭ aliajn problemojn. Ni postulos de la filioj almenaŭ sciigi nin ĉu ili ricevis protokolojn aŭ aliajn dokumentojn de ni senditajn.

Ni ree insistas ke filioj, siaflanke, plenumu ankaŭ tion, ĉar dum 1996 regule sendis siajn protokolojn nur Camagüey, Granma kaj Santo Domingo. Ni devas diri ke Santiago sendis siajn protokolojn, sed ne regule. La ceteraj filioj alfrontas problemojn por kunsidi aŭ eventuale ne kunsidas. Pri ĉi aspekto, ni analizis en antaŭaj kunsidoj; do, ni konsideras ĝin kiel nepran taskon kiu rekte influas la tutlandan laboron.

## MEMBRO-SUBTENANTOJ

Kiel decidite en antaŭaj jaroj, la NE elektis komisiiton por atento al Membroj Subtenantoj (MS) tutlande; do, k-do. Miguel Angel González entuziasme entreprenis la taskon, sed devis alfronti problemojn pro manko de reago flanke de la filioj. Nur Santo Domingo kaj Sancti Spíritus reagis al informpeto pri MS.

Fine de la unua semestro 96 estis entute 42 MS. Po unu en Camagüey, C. de Avila, V. Clara, P. Betancourt kaj Granma, kaj po du en Havano kaj Sancti Spíritus, Guantánamo (3). Elstaris Santiago de Cuba (17) kaj Havanurbo (15). Aliaj filioj ne havas tiun membrokategorion.

Al ili oni sendis **Avanco**-n 2/95, **Avanco**-n 1/96, cirkuleron kaj salutmesaĝon.

Fine de la jaro, nia komisiito sendis enketilojn por konstati pretecon de tiuj personoj remembriĝi samkategorie, sed nur reagis personoj el S. Spíritus (1) kaj Havanurbo (2).

Ni konsideras ke ankoraŭ ekzistas bona potencialo por plialtigi nian reton de MS tra la lando kaj kongrue plibonigi la atenton al tiuj membroj; tamen, multe dependas de interesiĝo kaj postulemo de niaj MS mem.

## DUA NACIA KONGRESO

Inter la 6-a kaj 9-a de marto, okazis nia Dua Nacia Kongreso, depost 8-jara paŭzo ekde la Unua Kongreso, okazinta en 1987. La kongresaj preparoj komenciĝis ekde 1995 kaj ni povas konsideri ĝin tre sukcesa.

Partoprenis la Kongreson 100 kubanoj kaj 13 eksterlandaj esperantistoj, kio multe helpis utiligi la lingvon kaj stimuli kubajn esperantistojn al E-a parolado dumkongresa. La lingva nivelo estis tre bona, kaj la kultura programo briligis la eventon, kie ĉiuj pasigis agrablan kaj klerigajn travivaĵojn.

## INFORMADO

Okaze de la 13-a Komitatkunsido, ni interkonsentis ke ĉi fako rolu prioritate en la tuta agado de nia Asocio, tial ke de ĝi multe dependas nia laboro, pro tio ke informi kaj varbi novajn adeptojn estas taskoj intime ligitaj.

Alvenis nun la momento analizi la faritan laboron kaj ni devas konscii ke eventuale la realo ne kondutis elstare; tamen, grava parto de nia laborplano pri informado estis kontentige evoluinta. La lando daŭre restis en grava krizo rilate al gazetaro, tial ke niaj eblecoj enpenetri tiun sferon restis reduktitaj; sed, rekonindas ke multon pli oni povis fari en radio kaj aliaj amaskomunikiloj, ne nur je nacia nivelo, sed ankaŭ en la unuopaj teritorioj. Ni konsciu ke plendoj pri neinformiteco ĉiam estos; tamen, kiel dirite pasintjare, ni devas pli regule, do, sisteme labori sur ĉi tereno. Evidentas ke ni ne kontentas entute pri la laborrezultoj ĉi fake.

Dum la jaro, ni sukcesis fortigi niajn ligojn kun la nacia informagentejo AIN kaj kun nacia radiostacio **Progreso**. En aliaj provincoj, kiaj Santiago, stabile oni disaŭdigis E-programon, kaj dum 1996 la E-redakcio de **Radio Havano Kubo** (RHK) daŭre laboris kaj eĉ plimultiĝis aŭdraportoj kaj solidaraj esprimoj el diversaj kontinentoj. Tamen, ni alvokas esperantistojn kapablajn el aliaj regionoj pliproksimiĝi al la E-redakcio kaj kunlabori, kiel jam ekfaras Norberto Díaz, el Sancti Spíritus, akceptinte peton de la redaktorino.

Aliflanke, ni plenumis sufiĉe viglan leterumadon landan kaj eksterlandan. Ni leteris al televizio nacia kaj al esperantistoj tra la lando rilate al kreado de **Avanco**-korespondantoj. Pri tio, mankis reagoj kaj ni insistas unu plian fojon pri la bezono je kunlaborantoj por ke la gazeto respegulu la tutan landan movadon. Tiurilate, nur kunlaboras Havanurbo, Sto. Domingo kaj S. Spíritus. Ĝuste tial ni devas diri ke unu el la plej tiklaj eroj de nia laboro estis la eldonado de **Avanco**, nia oficiala organo, kiu prokrastiĝis multe pli ol dezirate pro diversaj kialoj laboraj, teknikaj kaj eĉ personaj. Krome, ankaŭ zorgigas nin ke niaj homoj kaj specife la estraranoj tra la lando ne multe postulas pri ĝi, kvazaŭ ne sentu ĝin sia. Do, ni devas multe pli atenti la organon, verki por ĝi kaj maltrankviliĝi kiam ĝi ne ĝustatempe aperas.

Rilate al **La Noktuo**, endas diri ke aperis ĝiaj ses numeroj regule, kvankam ni devis solvi materiajn rimedojn tiucele; tamen, ĝi rolis pli dinamike kiel informilo eĉ al eksterlando. Ni insistas ke filioj devas ankaŭ kontribui per informoj.

Problemo ne solvita rilatas al **Universo**, kiu hispanligve celas la gazetaron nacian. La enhavo pretis, sed ne eblis ĝin presi. Anstataŭe, ni preparis cirkuleron kun la sama enhavo, sed eĥo ne okazis. Ĝi restas kiel pendanta kaj bezonata tasko por la jaro 97. Alia pendanta afero rilatas al eltrovo de kiel eble plej taŭga kunlaboranto por nia fako. Ni daŭre tenos tion kiel farendo.

Nia informa fako ankaŭ laboris por respeguli internacie la laboron de nia Asocio, kio nur kontentige okazis kaj multe danke al persona kontribuo de kelkaj esperantistoj, inter ili Alberto García Fumero, Olga Lidia Meneses, ambaŭ pri literaturaj temoj; kaj ankaŭ Norberto Díaz, kiu certe pere de **Jajabo** faras laŭdindan kaj regulan laboron por informi pri KEA, nacie kaj internacie, kiel ja rekonatas. Alia filio kiu eldonis pli modestan, tamen, legindan bultenon estas Santo Domingo, nome **Verda Lumo**. Daŭris publikigoj en **Monato** far Emilio Rodríguez kaj Maritza Gutiérrez. Tamen, ni alstrebos multe pli instigi esperantistojn kontribui tiudirekte.

Afero ne forgesinda estas ke ĉi jare, kiel rezulto de radia intervjuo kiun partoprenis Julián Hernández kaj Juan L. Besada en provinca radiostacio, la informa servo televizia interesiĝis pri Esperanto, kaj post bezonataj kunordigoj, ni venigis skipon de la televizio por filmi la Sidejon. Tiucele, Maritza estis intervjuita kaj fakte oni elsendis la raporton dufoje, unu el ili en la vespera teleĵurnalo, kiu posedas altnombran telespektantaron tutlandan. Certe, oni povas konsideri ĉi okazaĵon kiel la plej efika informado pri E-o dum la jaro 96 en Kubo.

Alía bona momento por la landa informa fako estis la Librofoiro Havano 1996, kie ni prezentis budon kun ekspozicio pri libroj kaj miloj da personoj havis la okazon informiĝi pri KEA kaj E-o.

## INSTRUADO

Ni konsideras ke, ĝenerale, la laboro dum 1996 modeste pliboniĝis, kompare kun 1995, kvankam indus tion analizi laŭteritorie. Konstanta baro en la tutlanda instrua fako rilatas al nebona fluo de informoj por korekta aktualigo de statistikoj kaj pli rapida reago niaflanke. Escepte de Santiago de Cuba, Camagüey kaj Sto. Domingo, ŝajnas ke la ceteraj filioj ne konscias pri la graveco de tiu aspekto en la ĝenerala rezulto de nia laboro.

**a.** *Perkoresponda (baza) kurso*

Kompare kun la antaŭa jaro, ni devas diri ke tiu ĉi kurso ne plenumis la atenditajn rezultojn rilate aniĝon de novaj membroj al la Asocio. Ni konsciu ke PKK daŭre restas kiel la plej bona alternativo por personoj kiuj ne povas ĉeesti regulajn kursojn, do potencialo estas. Nu, rekonindas ke, tra la lando, mankis sistema laboro tiucele kaj ni ĉiuj devas alstrebi ĝian sukcesigon.

Rezulto de la menciita situacio estas ke ankoraŭ nun mankas informoj por statistika raporto, malgraŭ peto farita pasintdecembre al koncernaj respondeculoj.

Rilate al la sonregistrado de kasedoj por kursanoj, ni konsideras ĝin nekontentiga, pro kialoj diversaj, eĉ organizaj, kiuj bremsis rapidan reagon al mendoj de interesitoj. Estonte, ni taskigos personon por tia laboro kaj, kune kun organizaj ŝanĝoj, ni esperas atingi pli rektan kontrolon, tiel ke nia servo fariĝu pli kvalita.

**b.** *Regulaj kursoj*

Dum la jaro, okazadis regulaj kursoj en Pedro Betancourt, Las Tunas, Havanurbo, Santiago de Cuba, Granma, Guantánamo kaj Camagüey. Tamen, ni ne povas strikte kompari kun la antaŭa jaro pro manko de informoj, kvankam evidentas ke la kursoj revigliĝis en teritorioj kiaj Las Tunas kaj Granma, laŭ informoj ricevitaj parole aŭ protokole el ambaŭ filioj.

Bona novaĵo rilatas al eventuala kurso jam organizata en Cienfuegos, depost kelkjara strebo tiucela, flanke de la NE kaj de unuopaj esperantistoj, pli precize nun José L. Montes de Oca.

**c.** *Distanca kurso (supera perkoresponda kurso)*

Kiel informite dum la pasinta Komitatkunsido, ni arigis 49 personojn, sed la situacio restas kiel komence de la jaro, pro manko de reala intereso flanke de la plimulto da homoj pri tia kurso. Restas aktivaj en tiu kurso ne pli ol 5 personoj. Niaflanke, estis faritaj pluraj intencoj revigligi la kurson, sed ankoraŭ senrezulte. Plurfoje, la Estraro analizis tion dum la jaro, kaj ni listigis la kursanojn por ke baptopatroj iniciatu manieron renversigi la situacion, sed bezonatas kontribuo de la filioj.

**ĉ.** *Nacia Seminario por Instruistoj*

Inter la 4-a kaj la 6-a de julio ĉijare, oni organizis la jam tradician Seminarion por Instruistoj, kiun partoprenis instruistoj el la tuta lando. La ĉijaran renkontiĝon partoprenis 8 esperantistoj kaj, laŭ la kutima enketo, ĉiuj partoprenintoj samopiniis pri ĝia sukceso ekde ĉiuj vidpunktoj. Ni planas estonte enkonduki kelkajn ŝanĝojn en la organizo kaj enhavo de la programo, tiel ke la rezultoj estu ankoraŭ pli fruktodonaj kaj pli transcendaj en la sekva laboro de instruistoj en la koncernaj teritorioj.

**d.** *Atento al ILEI-sekcio*

Dum la jaro, oni liveris al la plej elstaraj filioj kelkajn lernomaterialojn ricevitajn en malgranda kvanto kiel donaco de eksterlandaj samideanoj. Kadre de diversaj renkontiĝoj kaj ankaŭ dum la Seminario por Instruistoj oni disdonis ekzemplerojn de **Internacia Pedagogia Revuo** (IPR) al ĉiuj filioj kaj ankaŭ ekzemplerojn de **Juna Amiko**.

En decembro, oni dissendis, kaj en aliaj kazoj disdonis, gratulkartojn naciskale okaze de la Instruista Tago kaj de la jarfino. Kiel parto de nia stimula politiko, dum 1997, ni stimulos la laboron de la plej elstaraj filioj en tiu ĉi fako. Aliflanke, ni konscias ke la stimulo al niaj instruistoj estas nesufiĉa kaj ke ankaŭ oni devas serĉi aliajn vojojn kaj esplori novajn manierojn stimuli ilin.

Tamen, ni devas pli insisti rilate al tiu ĉi fako en la agado de nia Asocio tutlande, tial ke la instrua fako devas esti konstanta prioritato de nia laboro kaj eventuale ne ĉiuj filioj postulas de sia ILEI-respondeculo pli organizitan kaj konstantan atenton pri la diversaj kursoj ofertataj al la publiko.

**e.** *Porinfanaj grupoj kaj rondoj*

Dum la jaro 96, tra la lando, daŭris la laboro rilate la atenton al infanaj grupoj en Pinar del Río, Sta. Cruz del Norte, Camagüey, P. Betancourt, Las Tunas, Sto. Domingo, Santiago de Cuba kaj Havanurbo. Kompreneble, tiu ĉi laboro dependas de la lokaj kondiĉoj kaj homaj fortoj. En tiu ĉi aspekto, menciindas la laboro, pro ĝia konstanteco, de Maria Luz Moya, José L. Montes de Oca, José de J. Campos kaj Olga L. Meneses, kies laboro por perkomputila lernoprogramo ricevis monhelpon de E-Fondaĵo Carson.

## INTERNACIAJ KAJ PUBLIKAJ RILATOJ

**a.** *Publikaj Rilatoj*

Niaj publikaj rilatoj estis aktivaj dum la jaro kaj ebligis plifortigi niajn ligojn al la kultura, politika kaj socia vivo tutlanda. Kiel tradicie, ni subtenis regulan kontakton kun la kultura fako de la Komunisma Partio, ministerioj pri Kulturo, Justico kaj Edukado; Junkomunisma Organizaĵo kaj Kuba Instituto pri Radio kaj Televido (ICRT). Ni iniciatis kontaktojn kun Ministerio pri Eksteraj Rilatoj. Samtempe, ni reaktivigis niajn rilatojn kun Kuba UNO-Asocio, eldonejo José Martí, Fakultato pri Fremdaj Lingvoj, Asocio de Lingvistoj, Latina Unuiĝo, Fondaĵo Fernando Ortiz, RHK kaj aliaj radiostacioj kaj amaskomunikiloj.

Dum la jaro, KEA oficiale akceptis baptopatri la najbaran infanvartejon. Kiel konkreta paŝo oni decidis donaci al ili utilajn labormaterialojn.

**b.** *Internaciaj Rilatoj*

Celante regulan kontakton kun la internacia E-movado kaj specife por evoluigi E-on en Latinameriko, niaj rilatoj aktivadis kiel kutime kun UEA, TEJO, ILEI, KUUK kaj aliaj naciaj kaj fakaj asocioj, kaj gazetoj esperantistaj.

Februare, Juan Ramón Rodríguez, membro de la Amerika Komisiono, ĉeestis la 3-an Amerikan Kongreson en Kostariko, kiel konkreta paŝo en pli rekta kunlaboro ene de nia regiono; ĉi jare, partoprenis la 81-an UK-on, en Prago, trimembra delegacio, nome Julián Hernández, Manuel O. Rodríguez kaj Georgina Almanza; ni estis same reprezentitaj dum la 30-a ILEI-konferenco, ambaŭ eventoj en Ĉehio; survoje al Prago, du el niaj reprezentantoj vizitis Germanion kiel parto de kunlabora programo inter KEA kaj Germana E-Asocio (GEA), subskribita dum 1995. Tiu ĉi ĝemeliĝo kun GEA estis ankaŭ efika kaj daŭra en la senco ke dum nia Nacia Kongreso vizitis nin pluraj germanoj, inter ili Cristian Darbellay, estrarano pri Internaciaj Rilatoj de GEA kaj li iniciatis projekton kiu ligitas al la asocia faka agado.

Siaflanke, Georgina Almanza reprezentis nian movadon en Hispanio, Francio, Nederlando kaj Belgio. Ĉio ĉi konsiderinde favoris la interŝanĝon inter kubaj esperantistoj kaj la internacia E-movado.

Perletere, ni same kontaktis naciajn, fakajn kaj lokajn asociojn tra la mondo; kaj speciale, ni kontaktis la komisiiton de Ameriko ĉe UEA, Atilio Orellana, kaj informis la E-gazetaron. Al UEA-komisiito ni sendis niajn informilojn kaj informojn. Dum la jaro, ni ricevis gazetojn, ktp, kvankam ne tiel regule kiel dezirate.

**c.** *Aliaj taskoj*

**<u>Historio</u>**: Komence de la jaro, ni finpretigis kaj eldonis broŝuron pri KEA-historio: **La E-movado en Kubo**, unua kompleta skizo. Ĝi aperis okaze de la Dua Nacia Kongreso. Hispanlingva versio pretas por eldono. Dum la jaro, ni pretigis serion de artikoloj pri nia historio aperigitaj en **Avanco** kaj diskonigis ilin tra la lando dum renkontiĝoj kaj radioparoladoj.

Plia tasko estis regula esplorado kaj klasigo de dokumentoj eltrovitaj ĝis nun. Ni devas insisti pri tio ke, malgraŭ multaj instigoj tiucelaj, la municipaj kaj provincaj filioj neniel kontribuis tiurilate, almenaŭ nenion informis pri la lokaj historioj kaj tio bedaŭrinde prokrastas la laboron kaj nuligas gravajn partojn de la E-historio en Kubo, kiu preskaŭ centjariĝas.

**<u>Biblioteko</u>**: Dum la jaro, ni transmetis la bibliotekon en alian salonon de la Sidejo, kio iel malhelpis rilate la organizan laboron faritan dum 1995; tamen, ĝi ne ĉesis doni servojn, kvankam tute notindas la fakto ke malmulte oni profitas ĝiajn riĉaĵojn, eĉ havananoj.

Kompreneble, ni mem devas multe pli labori en tiu direkto serĉante novajn formojn stimuli niajn homojn al plua memkleriĝado.

**<u>Libroservo:</u>** Ni konscias ke la nunan jaron nia disponebleco pri libroj estis ne kontentiga; tamen, la rezulto en la jarfino rimarkigas nin ke, malgraŭ tio, ni sukcesis vendi materialojn kaj krei aliajn proprarimede, specife okaze de la Dua Nacia Kongreso, kie nia Libroservo pli vendis. El tio eblas konkludi ke, spite al malriĉa librostoko, per iniciatemo kaj laboro, oni povas atingi bonajn rezultojn. Tamen, ni devas diri ke la nuntempa aĉetovenda sistemo ne glate funkcias inter nia Libroservo kaj la filioj, kio tro ampleksigas la tempon en kiu nek la mono nek la materialoj posedataj de filioj atingas nian oficejon. Tio kaŭzas ke nuntempe centoj da pesoj ankoraŭ restas kiel pendantaj enspezoj pro tiu koncepto, kio ja domaĝas nian jaran buĝeton. Ni devas labori por solvi tiun situacion.

## KULTURO

Okaze de la pasinta Komitatkunsido, ni elektis novan estraranon pri kulturo, kio dum la antaŭlasta jaro estis solvenda afero. Malgraŭ tio, ni devas diri ke dum 1996 la kultura laboro restis sube de sia reala potencialo, kvankam la Nacia Kongreso montris ke ni havas homajn fortojn por multon pli fari. Ĝuste la Kongreso estis grava momento en la kultura vivo de KEA pro tio ke tiu evento estis nacia kultura manifestacio. Oni organizis deklam-konkurson kiel grava ero de la Kongreso kaj ĝi vere elstaris. Partoprenis pli ol 12 esperantistoj el diversaj provincoj deklamante kaj provizante la ĉeestantaron per vigla kongresa programero. El tio, ni konsciiĝis pri la valoro de tiaj kulturaj programoj por la estonteco.

Alia konstanta tasko de kulturo estis la sabataj aranĝoj en la Sidejo, kvankam ni absolute emas al ĝia konstanta plibonigo, tiel ke pli da esperantistoj profitu el niaj sabataj

renkontiĝoj.

Alia grava momento ĉi jara estis la partopreno de nia aktorino Georgina Almanza en la Kongreso de Prago, kie ŝi prezentis renovigitan repertuaron kaj unu plian fojon digne reprezentis la kuban arton kaj E-movadon.

Por la ĉijara Kongreso, ni surbendigis kasedojn kun kuba muziko kaj poemojn de G. Almanza, kio jam estas praktiko ĉiujara.

Dum la jaro estis kreita teatra grupeto kun la ideo impulsi tiun fakon nialande, sed en la praktiko ĝi ne povis multon fari; tamen, unuopuloj daŭre laboris tiudirekte. Estas kelkaj interesitoj pli impulsi tiun fakon kaj, kvankam ne regule, oni ion faras kadre de la sabataj aranĝoj.

Okaze de la 17-a datreveno de KEA, ni aranĝis specialan kulturan ceremonion en la sidejo de Kuba Instituto pri Libro , kie per solenaĵo kaj simpla kulturprogramo ni celebris tiun gravan datrevenon.

Ni devas diri ke, malgraŭ tiaj nekontesteblaj realoj, mankis konstanteco en tiu ĉi fako rilate al disponigo de kulturaj materialoj por ke la filioj multe pli profitu en tiu direkto la jam ekzistantajn kulturajn fontojn kreitajn de niaj homoj kaj la eltirindajn el nia biblioteko. Rilate al tio, direndas ke mankis plia kontaktemo kun la filioj, situacio iusence influita de objektivaj laborsituacioj flanke de la koncerna estrarano, kio sendube pliboniĝos en la nuna periodo. Tamen, konstatindas ke la filioj mem okazigis diversajn agojn en la kultura fako; inter ili, ekspozicioj kaj kulturaj prezentoj, inkluzive kun infanaj grupoj. Okaze de la vizito de italaj esperantistoj tra la lando, la filioj sukcesis tre bone organizi diversajn aranĝojn, kie iamaniere estis reprezentita la kultura laboro de la Asocio.

Inter la agoj de KEA ene de la socia vivo estis monkontribuo je mil pesoj por la nacia eldon-kampanjo pri la "Martí-aj lernokajeroj", farita publike dum kunveno ĉe la Ministerio pri Kulturo kiun partoprenis la koncerna ministro Armando Hart kaj aliaj asociaj reprezentoj ligitaj al tiu ministerio.

Rilate al la biblioteka servo, ni devas mencii ke k-do. Juan R. Rodríguez rekte okupiĝas pri ĝia organizado kaj aliaj tiurilataj taskoj; tamen, ĝi estas aspekto pri kiu nia kultura fako devos pli rekte atenti kaj kune ni devas ĝin aktivigi. Por tia celo, ni devos multon pli profiti el nia organo **Avanco** kaj pli sisteme instigi kaj stimuli, kunordige kun la filioj, la utiligon de nia biblioteko.

## SCIENCTEKNIKA AGADO

Ekde tiu ĉi jaro, KEA-komisiito pri Scienctekníka Agado estas Alberto García Fumero, kiu esence okupiĝis pri organizado de SAEST '97, t.e. Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko. Tiucele, li preparis du cirkulerojn kaj disdonis ilin inter la membraro. Oni ĝin anoncis en kelkaj internaciaj gazetoj. Nuntempe, oni kolektas resumojn de prelegoj kaj pri tio kunlaboras Roberto Torres, kiu siaflanke estas peranto de s-ro. C. Darbellay (el GEA) por publikigo de SAEST-prelegoj. Kadre de SAEST, la medicinistoj gviditaj de D-ro. Barreras intencas kunvenigi la membrojn de Kuba Esperanta Medicina Agado (KEMA). Indas scii ke li sukcesis pri malaltigo de kotiz-kvoto por membriĝi en UMEA.

Alia tasko iom post iom entreprenita estis diskonigo de E-o en scienctekníkaj medioj kaj inverse.

Ligita al tiu ĉi laborkampo estis renkontiĝo okazinta kun d-ro. Izao Carneiro, kiu vizitis Kubo-n denove por organizi alian kurson pri homeopatio kaj E-o en Kubo. Tiurilate, la dialogo estis fruktodona kaj KEA kunlaboros pri la E-instruado al kubaj medicinistoj venontfebruare. Oni planas renkontiĝon kun brazilanoj, kion organizos d-ro. Izao.

Ni devas konscii ke tiu ĉi laborfako meritas nian konstantan atenton pro tio ke ĝi donas realan utiligon de la lingvo kaj kontribuas gajni plian prestiĝon.

## JARBILANCO 1996

| Kodo | Enspezoj | Buĝeto | Jare | % |
|---|---|---|---|---|
| 1. | Kotizoj | 2200.00 | 2246.45 | 102 |
| 2. | Perkoresponda Kurso | 2500.00 | 1199.50 | 48 |
| 3. | Libroservo | 4000.00 | 4068.75 | 102 |
| 4. | Aliaj servoj | 12000.00 | 12113.95 | 101 |
| | **TOTALO** | **20700.00** | **19628.65** | **95** |
| 5. | Reklamoj | | 2400.00 | |
| | | | **22028.65** | **106** |

| Kodo | Elspezoj<br>Centra Oficejo | Buĝeto | Jare | % |
|---|---|---|---|---|
| 1.1. | **Pošto** | | | |
| 1.1.1. | Afranko | 300.00 | 382.50 | 127 |
| 1.1.2. | Telegramoj | 80.00 | 89.35 | 112 |
| 1.2. | Telefono | 0.00 | 0 | 0 |
| 1.3. | Elektro | 0.00 | 0 | 0 |
| 1.4. | Gaso | 294.00 | 294.00 | 100 |
| 1.5. | Riparoj diversaj | 1400.00 | 1545.00 | 110 |
| 1.6. | Salajro | 5000.00 | 6600.00 | 132 |
| 1.7. | Imposto | 2500.00 | 3032.40 | 121 |
| | **SUB-TOTALO** | **9574.00** | **11943.25** | **125** |

| Kodo | Nacia Estraro | Buĝeto | Jare | % |
|---|---|---|---|---|
| 2.1. | Komitatkunsido | 1500.00 | 1405.75 | 94 |
| 2.2. | Kontrolvizitoj | 1300.00 | 1304.00 | 100 |
| 2.3. | Informado | 100.00 | 0 | 0 |
| 2.4. | Instruado | 100.00 | 57.20 | 57 |
| 2.5. | Perkoresponda Kurso | 400.00 | 17.20 | 4 |
| 2.6. | Publikaj rilatoj | 100.00 | 92.00 | 92 |
| 2.7. | Artaj aranĝoj | 100.00 | 46.00 | 46 |
| 2.8. | **Eventoj** | | | |
| 2.8.1. | Expolingua | 200.00 | 0 | 0 |
| 2.8.2. | Librofoiro | 800.00 | 796.00 | 100 |
| 2.8.3. | Nacia Seminario | 500.00 | 625.00 | 125 |
| 2.9. | Estrara rezervo | 200.00 | 180.00 | 90 |
| | **SUB-TOTALO** | **5300.00** | **4523.15** | **85** |

| Kodo | Investoj | Buĝeto | Jare | % |
|---|---|---|---|---|
| 3.1. | Investoj por Sidejo | 300.00 | 282.40 | 94 |
| 3.2. | Investoj por servoj | 3000.00 | 3206.75 | 107 |
| 3.3. | Eldonagado | 400.00 | 570.00 | 143 |
| | **SUB-TOTALO** | **3700.00** | **4059.15** | **110** |
| | **TOTALO** | **18574.00** | **20525.55** | **111** |

| | | |
|---|---|---|
| **KEA 31/12/95** | **16810.05** | |
| **ENSPEZOJ '96** | **22028.65** | |
| **ELSPEZOJ '96** | **20525.55** | |
| | **18313.15** | |
| **KEA 31/12/95** | **16810.05** | |
| **KEA 31/12/96** | **18313.15** | |
| **PROFITO 1996** | **1503.10** | **+ 8.2 %** |

# PLENUMO DE ĈEFAJ TASKOJ DE KEA DUM 1996

1. Informado

1.1. Plenumita: Tamen, ni devas pli bone profiti la grafikan propagandon kaj aliajn rimedojn, tiel ke la ĝenerala publiko daŭre sciiĝu pri nia agado.

1.2. Parte plenumita: Bezonatas ke nia membraro entreprenu pli konstantan informadon pri KEA kaj E-o en sia medio.

1.3. Atento al la asociaj organoj: Malgraŭ la malfruo, la informa fako de KEA eldonis **La Noktuo**-n sesfoje en la jaro kaj **Avanco**-n trifoje. En 1997, ni devas esti pli akurataj ĉi rilate. Pri **Universo**, ne eblis ĝin sukcesigi ĉefe pro tempomanko.

1.4. Plenumita: Regule aperis novaĵoj pri KEA en la internacia E-gazetaro.

2. Disvastigo tra la lando kaj revigligo de filioj

2.1. Matanzas: Plenumita. Tamen, la esperantistoj en P. Betancourt nepre devas etendi la movadon en aliajn municipojn. Ili disvastigu kaj diskonigu la PKK-on.

2.2. Ciego de Avila: La Municipa Grupo en Morón pli stabiliĝis kaj solidigis sian agadon dum la jaro.

2.3. Villa Clara: La esperantistoj en Sto. Domingo daŭre laboras por evoluigi Esperanton en la municipo kaj al aliaj provincoj, kiel Ciego de Avila kaj Cienfuegos; tamen, la agado en municipo Sta. Clara ne progresas.

2.4. Pinar del Río: La Municipa Grupo reiniciatis sian laboron, sed pro la iama malsano de la nuna gvidantino ne multe antaŭeniris.

2.5. Granma: Danke al strebado kaj konstanta laboro de la tieaj esperantistoj, la movado iom revigliĝis dum 1996.

2.6. Holguín: Pro manko de informoj, ne eblas precizigi la situacion de la movado ĉi province.

2.7. Cienfuegos: Dank' al la laboro de la naciaj estraranoj, kiuj plurfoje priparolis la aferon kun funkciuloj de la Ministerio pri Kulturo, eĉ kun la direktoro pri kulturo de tiu provinco, kaj aliflanke, pro la organiza laboro entreprenita de J. L. Montes de Oca, jam oni donis gravajn paŝojn en la tasko estigi movadon esperantistan en tiu provinco.

3. Organizaj demandoj kaj interna administrado

3.1. Membro-kontrolo kaj kotizoj: Filioj regule aktualigas siajn kontrolojn pri la membraro, sed ankoraŭ ne ĉiuj akuratas en tiu tasko kaj en ĝia posta sendado al NE. Pri kotizoj, ni devas konsideri la rezulton kontentiga, sed foje tro lanta.

3.2. Atento kaj vizitoj al filioj: La naciaj estraranoj daŭre atentis kaj vizitis la filiojn dum la jaro. Pro diversaj kialoj, ne efektiviĝis la daŭre anoncita vizito al Camagüey.

3.3. Plenumitas la kontrolo pri membro-subtenantoj: Tamen, ni insistas ke ĉiu filio devas rekte atenti siajn MS-ojn.

3.4. Plenumitas atento al komitatanoj: Perletere aŭ cirkulere kaj per aliaj regulaj kontaktoj, ni flegis la internan informan fluon, krom en la kazo de Holguín.

4. Financoj

Pri tiu tasko, ni konsideras ke ĉio plenumitas, kvankam ni, pli kaj pli, konsilas la filiojn kreskigi konscion pri memfinancado. Ni aparte laŭdas la laboron de nia estrarano pri financoj.

5. Instruado

5.1. Regulaj kursoj: Oni daŭre ilin instruas, malgraŭ realaj malfacilaĵoj nuntempaj. La filioj ne informas pri la stato de tiaj kursoj.

**5.2.** Perkoresponda kurso: Iom kreskis, sed nekontentige laŭ niaj planoj.

**5.3.** Distanca kurso: Neplenumita. Malgraŭ pluraj klopodoj de la koncerna estrarano, la filioj ne konsciiĝas pri la graveco de tiu kurso.

**5.4.** Atento al ILEI-sekcio: Plenumita. Tamen, menciindas la laboro de la koncernaj ILEI-respondeculoj en Santiago kaj Camagüey.

**5.5.** La tutlanda seminario sukcese efektiviĝis: Informoj en rilato kun filiaj seminarioj ne venis.

**6.** Kulturaj kaj klerigaj aranĝoj

**6.1** Parte plenumita. Ankoraŭ ni devas labori multe pli tiucele.

**6.2.** La estrarano pli kulturo devas pli flegi la kulturan aktivadon de la filioj kaj provizi ilin per taŭgaj materialoj tiucele.

**6.3.** Plenumita. Ni multe pli devas ankoraŭ fari.

**6.4.** Ne plenumita.

**6.5.** Ni devas stimuli nian membraron pli utiligi kaj profiti librojn kaj alispecajn materialojn ekzistantajn en niaj bibliotekoj.

**6.6.** Plenumita. La regionaj renkontiĝoj efektiviĝis tre bone.

**7.** Publikaj rilatoj

**7.1.** Plenumita: Tamen multe pli ekspluatendas.

**7.2.** Plenumita: Bone marŝas la rilatoj kun registaraj instancoj kaj kun la rilat-organo.

**8.** Internaciaj rilatoj de la Asocio

**8.1.** Plenumita: Ni regule kontaktis kun UEA kaj aliaj landaj asocioj kaj institucioj.

**8.2.** Plenumita: Ni kontribuis al evoluo de E-o en Latinameriko.

**9.** Faka agado

**9.1.** Plenumita: Kvankam tre malmultaj interesiĝas pri faka utiligo kaj laboro tiukampe.

**9.2.** Plenumita: Niaj asociaj organoj kontribuis tiucele.

**9.3.** Plenumita: La fakto ke okazos SAEST '97, stimulis fakulojn al utiligo de Esperanto en scienco kaj tekniko.

## ĈEFAJ TASKOJ DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO POR 1997

**1.** Informado

**1.1.** Regula informado pri E-o, la internacia E-movado kaj KEA pere de ĉiuspecaj amaskomunikiloj kaj aliaj rimedoj (kun emfazo en la grafikaj), tiel ke la ĝenerala publiko pli bone sciiĝu pri nia agado.

**1.2.** Konsciigi la membraron pri la bezono kaj graveco entrepreni personan kaj konstantan informadon pri KEA kaj E-o en sia medio.

**1.3.** Atento al asociaj organoj: Eldono de **La Noktuo** (sesfoje jare), **Avanco** (trifoje), **Universo** kaj aliaj filiaj bultenoj.

**1.4.** Zorgi pri regula apero de KEA en la internacia E-gazetaro.

2. Disvastigo tra la lando kaj revigligo de filioj

2.1. Holguín

2.2. Cienfuegos

2.3. Villa Clara

2.4. Pinar del Río
2.5. Ciego de Avila
2.6. Matanzas
2.7. Granma

3. Organizaj demandoj kaj interna administrado
3.1. Membro-kontrolo kaj kotizo.
3.2. Atento kaj vizitoj al filioj.
3.3. Kontrolo de membroj-subtenantoj
3.4. Atento al komitatanoj. Flegi la internan informan fluon.

4. Financoj
4.1. Fiksi strategion por plenumi efike la buĝeton de la nacia banko, BFI kaj PF-kontoj.
4.2. Flegi la eldonan politikon ekde financa vidpunkto.
4.3. Atenti la filiojn kaj kreskigi la konscion pri memfinancado je ĉiuj niveloj.

5. Instruado
5.1. Regulaj kursoj.
5.2. Kreskigi la Perkorespondan Kurson.
5.3. Firmigi la funkciadon de la Distanca Kurso.
5.4. Atento al ILEI-sekcio. Analizi la laboron de la ILEI-reprezentantoj kaj laŭbezone elekti aliajn respondecajn homojn por tiu grava posteno kaj kontroli regule ilian laboron flanke de la koncerna Provinca Estraro.
5.5. Tutlanda kaj filiaj seminarioj.

6. Kulturaj kaj klerigaj aranĝoj
6.1. Konsciigi la membraron pri la historiaj kaj kulturaj valoroj de la movado pere de ĉiuj disponeblaj rimedoj.
6.2. Flegi la kulturan aktivadon de la filioj kaj provizi ilin per taŭgaj materialoj tiucele.
6.3. Atenti la jam ekzistantan reton de amatoraj kaj profesiaj artistoj kaj varbi novajn.
6.4. Stimuli la asocian reprezenton en kulturklerigaj eventoj eksterasociaj.
6.5. Zorgi pri korekta utiligo de la bibliotekaj servoj je ĉiuj instancoj.
6.6. Stimuli la filiojn okazigi regionajn renkontiĝojn kulturklerigajn.

7. Publikaj rilatoj
7.1. Ligi la Asocion al la kultura vivo de la koncerna loĝloko. Rilati al aliaj asocioj kulturklerigaj.
7.2. Rilatoj kun politikaj, registaraj, edukaj kaj kulturaj instancoj je ĉiuj niveloj. Daŭre teni viglajn kontaktojn kun la rilatorgano.

8. Internaciaj rilatoj de la Asocio
8.1. Teni regulajn kontaktojn kun UEA, latinamerikaj landaj asocioj, ILEI, Germana E-Asocio, aliaj landaj asocioj kaj E-institucioj.
8.2. Daŭre kontribui al evoluo de E-o en Latinameriko.

9. Faka Agado
9.1. Atento al interesitoj pri faka agado tutlande.
9.2. Daŭre informi al la membraro pri apliko de E-o en scienco kaj tekniko enlande kaj eksterlande.
9.3. Stimuli fakulojn al utiligo de E-o en scienco kaj tekniko.

# KOMITATAJ DECIDOJ

Nia Komitato ne sterile laboris plenkunside; tute male, el nia jara kunveno fontis kiel tradicie aro da interkonsentoj kiuj konsistigas kernan farendon en la jara agado de la Asocio.

La komitatanoj decidis ke bezonatas elekti respondeculon pri historio en la koncernaj teritorioj, kiuj devas kontribui en la celo kompletigi tiun taskon tra la insulo per kunlaboro eĉ de malnovuloj en la movado. Alia interkonsento rilatas la pagon de ŝuldoj de la filioj pro lernomaterialoj menditaj al KEA-libroservo.

Krome, oni decidis prepari kondiĉojn por organizi en 1998 nacian kulturan festivalon en la orienta provinco Santiago de Cuba; aliflanke, estis kompletigita la kontrolkomisiono pri financoj, kies membroj estas Norberto Díaz, Rafael Cabrera kaj Marta Alonso; la filioj, de nun, rekte sonregistros la kursojn por siaj lernantoj de la PKK kaj tiurilate oni fiksis minimuman kvoton, kiun la filio klopodos plenumi por kreskigi la kvanton da kursanoj.

Kiel kutime, oni fiksis la sidejon de la sekvonta Komitatkunsido, kiu estos la orienta filio Granma, tial ke ĝi tre bone kaj stabile laboris dum la pasinta jaro. Kvankam oni ne faris tion antaŭe, ĉi foje oni fiksis la sidejojn de la 16a kaj 17a plenkunsidoj de la Komitato por 1999 kaj 2000, respektive Havano kaj Santiago de Cuba. La jaro '99 estos kongresa jaro kaj, tial, oni decidis kune kun la Kongreso okazigi la Komitatkunsidon, kio influis la elekton de Havanurbo por ambaŭ eventoj.

Por la nuna jaro, la komitatanoj favoris efektivigon de tri E-renkontiĝoj en diversaj regionoj, nome Camagüey, Sancti Spíritus, en la centro; kaj Guantánamo, en la ekstrema oriento. Kiel interkonsentoj, la Komitato aprobis la jaran raporton pri la laboro de la Asocio dum 1996 kaj la buĝeton por 1997.

Kiel elemento kiu povus stimuli la tutlandan labormanieron, oni proponis konkurencon jaran inter la filioj, kio respegulas la entuziasmon kaj iniciatemon de nia supera gvida instanco, kies supra celo estas flegi kaj progresigi la movadon en Kubo.

*Maritza Gutiérrez*